

ZELANDO PREZENTAS SIN

DUM LA 4^A K.T.P. RENKONTIĜO
DE LA 9^A - 11^A DE OKTOBRO 1987



"LUCTOR ET EMERGO"



"MI LUKTAS KAJ ELMERGIĜAS"


ENKONDUKO

La ideoj de la nova nederlanda grupo de "Tridekplusuloj" komencas esti pli kaj pli konataj, ĉe Nederlandanoj same kiel ĉe eksterlandanoj. Nun, unu jaron post la fondo kaj en kunlaboro kun la Zelanda Esperanto Grupo, ni invitas vin viziti la belan provincon Zelando-n, kiu multe ofertas al ĉiuj kiuj interesiĝas pri naturo kaj kulturo.



LA EJO

Ni loĝos en la etosplena junulargastejo kastelo "Westhove", kiu datiĝas de la 13a jarcento, sed kiu estas tre komforta. Ĉiuj ĉambroj havas 4 aŭ 6 litojn. La kastelo situas meze de arbaro kaj la marbordo estas nur je ses minuta promendistanco. En la tuja proksimeco vi trovas kelkajn turisme interesajn urbetojn kaj la ĉefurbo de Zelando situas nur 12 km-ojn de la kastelo.



PROGRAMO

La ĉeftemo estas "Zelando kaj ĝia naturo". Kompreneble estos en la programo promenado en la arbaro kaj apud la marbordo, kaj vizito al la "Zelanda Biologia Muzeo", kiu situas apud la kastelo. Ni planas ankaŭ viziti la malnovan urbon *Middelburg* kaj eble ni iros al la piliera digo – la grandega nova konstruaĵo – en Orienta Skeldo. Krome ni trovos tempon por diversaj aliaj temoj kaj aktivaĵoj.

INFORMO

(pri la kunveno en Zelando): Rob Ebenau, Appelstraat 235, 4462 TK Goes, ☎ 01100-30956; aŭ (je ne-respondo): Rie & Kees Dentz, ☎ 01180-14834.
(pri 30+-agado): Gerard Gerritse, Meijhorst 17-55, 6537 KE Nijmegen, ☎ 080-446803.

PAGO

al poŝtĝirkonto 34563 de NEA Amstelveen kun indiko KTP-Zelando.

ALIGILO

Mi aliĝas al la KTP-kunveno en Zelando (9-11 oktobro 1987) laŭ la kondiĉoj kaj prezoj presitaj dorsflanke (plenigu klare, MAJUSKLE)

Familia nomo: Persona nomo:

Sekso: ino/viro Naskiĝdato:

Kompleta adreso kun poŝtkodo:

Lando: Telefono:

Vegetarano Partatempulo, nome de ĝis

NEA-membro Mi ĝiris antaŭpagon de f 25,-.

KOTIZOJ

<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

ATENTIGOJ

- La ricevo de minimume po *f* 25,- da antaŭpago difinas la aliĝperiodon.
- La kotizoj inkluzivas manĝojn, loĝadon kaj programon.
- NEA-membroj ricevas *f* 10,- da rabato.
- Tiuj, kiuj sin retiras ricevos sian kotizon minus *f* 15,-, kondiĉe ke ni estu informitaj pri la retiriĝo antaŭ 25-09-1987.
- Eblas transdoni sian aliĝon al alia persono, kondiĉe ke la ricevinto montru skriban ateston de la transdoninto.
- Eblas partatempa partopreno, sed ni preferas plentempa aliĝojn.

